

AMERIKA ESPERANTISTO

DECEMBER, 1920



OFFICIAL ORGAN OF
**THE ESPERANTO ASSOCIATION
OF NORTH AMERICA**

AMERIKA ESPERANTISTO

OFFICIAL ORGAN of

The Esperanto Association of North America, Inc.

a propaganda organization for the furtherance of the study and use of the International Auxiliary Language, Esperanto.

CO-EDITORS: NORMAN W. FROST

H. M. SCOTT

MRS. I. M. HORN

CLUB DIRECTORY

This department is conducted solely for the benefit of our organized groups throughout the country. It furnishes a means of keeping in close touch with the work in other cities, for the exchange of ideas and helpful suggestions, and for the formation of valuable friendships in a united field of endeavor.

BERKELEY, CALIF.

Berkeleya Esperanta Rondo.—Classes Monday and Tuesday evenings at 8.00.—Meetings Thursday evenings at 2508 Vine St. Address Vinton Smith, 530 52nd St., Oakland, Calif.

OAKLAND, CALIF.

Oakland Esperanta-Rondo; L. D. Stockton, Bibliotekisto, 420 15th St.

SAN FRANCISCO, CALIF.

San Francisco Esperanto Rondo; meets second Monday eve., 414 Mason St., Santa Clara Hall. Miss G. Wehsler, Secy. 2776 Bush St. Kalifornia Esperantista Rondaro meets first Tuesday evenings, Room 121 Chronicle Bldg., San Francisco. M. D. Van Sloun, Secy., 946 Central Ave.

MONTRÉAL, CANADA.

Montreal Esperanto Association meets each Tuesday and Thursday at 8.15 P. M. in Room 13, The Tooke Bldg., Sec., Miss E. Strachan.

Esperanto meetings every Saturday evening at 8 P. M. at 20 Selkirk Ave. ALL are welcome.

WASHINGTON, D. C.

La Kabea Esperanta Klubo meets every Wednesday, at 8.30 P. M., at the Thompson School, XIIth and L Sts., N. W.

Kolumbia Esperanto Unuiĝo. Public meeting third Wednesday of each month, 8.30 P. M., XIIth and L Sts., N. W. Free class at 7.30 P. P. every Wednesday, same address.

CHICAGO ILLS.

La Gradata Esperanto-Societo, Dvorak Park. Jaroslav Sobehrad, Sec'y. 1116 W. 19th Place.

La Esp. Oficejo. 1669 Blue Island Ave. Kunvenas 2an kaj 4an sab. ĉiumonate. 19

BOSTON, MASS.

Boston Esp. Soc., 507 Pierce Bldg., Copley Sq. Meets Tues., 7 P.M. Miss A. Patten, Sec.

WORCESTER, MASS.

Worcester County Esperanto Society. Business Institute, every Friday, 8.00 P.M.

DETROIT, MICH.

Detroit Esperanto Office, 507 Breitmeyer Bldg., open daily. Library at disposal of everybody daily, 7 A.M.-9 P.M., except Tues. and Fri. Classes meet Tues. and Fri., 8.10 P.M.

La Pola Esperanto Asocio, B. Lendo, Sek., 413-5 E. Canfield Ave.

Groups are listed for 12 issues of the magazine, at a cost of only 25 cents for the two-line insertion. Extra lines are 10 cents each additional. The heading,—name of city or town—is inserted free. This matter warrants the immediate attention of every club secretary.

PORTRLAND, ME.

Portland Esperanto Society, Trelawny Bldg. Miss Emma Sanborn, Sec'y, 16 Conant St.

HEBRON, NEBRASKA.

La Hebrona Grupo kunvenas ĉiun Jaŭdon 8 P.M., 660 Olive Ave., kaj ĉiun Dimancon 10 A.M., 500 Olive Ave. Roland Jeffery, Pres., Harry Hogrefe, Vice-Pres.

HOBOKEN, N. J.

"I.O.O.F. Esperanto Club No. 1 of Greater N.Y." meets every Tuesday at 8.30 P.M. in 61 First St., 3rd Floor West. All welcome. Pres., Mrs. M. O. Haugland; Sec'y Wm. Preusse; Instructor, A. Mendelson. Address all communications to the secretary at above address.

BUFFALO, N. Y.

Buffalo Esperanto Society, A. E. Warren, Pres.; Miss Ray Morris, Sec.; meets Thursday evenings at 60 High St. 19

NEW YORK CITY, N. Y.

The New York Esperanto Society, Miss L. F. Stoeppeler, Sec., 105 West 94th St. The Barco, or Esperanto Supper, is held on the third Friday of each month 6.45 P. M. Information from the Secretary.

La dimanĉa kunveno, al kiu ĉiuj estas bonvenaj, okazas je la tria horo, posttagmeze, ĉiun dimancon, ĝe la loĝejo de S-ro Joseph Silbernik, 229 East 18th St., Manhattan.

CLEVELAND, OHIO.

La Zamenhofa Klubo; S. Kozminski, Sek., 3406 Meyer Ave.

ERIE, PA.

La Pola Studenta Societo, Prof. E. Bobrowski, ing., St. John Kanty College, eldonas monatan jurnalon, "La Studento," jara abono \$1.00.

PHILADELPHIA, PA.

Phila. Esp. Soc. Miss Marie Knowlan, cor. Sec., 1420 18th St. Meets 4th Fri., Hotel Hanover, 12th and Arch Sts. N. York Ave. 19

Rondeto de Litovaj Esperantistoj, 2833 Livingston St.

Esperanta stelo de Polujo.. Sekr., S. Zysk. Kunvenas mardon vespere inter 8-10 h., 507

PITTSBURGH, PA.

Esperanto Sec., Academy of Science and Art. J. D. Hailman, Sec., 310 S. Lang Ave. Fridays, 8 P. M.

MILWAUKEE, WISC.

Hesperus Esperantists. Sino B. H. Kerner, Sek., 629 Summit Av., 3d Tuesdays, 8 P.M. 19

Amerika Esperantisto

American Esperantist

WEST NEWTON, MASS.

Entered as second-class matter May 15, 1913, at the Postoffice at West Newton Station, Boston, Mass., under the Act of March 3, 1879.

A true translation of the non-English portion of this magazine filed with the Postmaster, Boston, Mass.

Every article in this magazine (unless expressly excepted) may be translated or reprinted without further permission.

One Dollar a Year. Single Copy Ten Cents.
Po Dudek Respond-Kuponoj aŭ Du Spesmiloj (Oraj) Jare.

Published Monthly by

THE ESPERANTO ASSOCIATION OF NORTH AMERICA

The Esperanto Office, Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass., Usono.

Vol. 27.

December, 1920.

No. 2

A SUGGESTION FOR CHRISTMAS A LIGHT THROUGH THE DARKNESS

The Condition:

He was a brave young man from one of the formerly Russian countries—never mind which one. Along the village street he made his way haltingly, feeling out his path with a cane. Only rarely did he come forth from the one room cottage where his parents had reared their son up to his glorious manhood. Seldom, indeed, did he venture, as now, a little way down a cross road and catch a verse or two from some sad melody sung by a sweet maiden voice.

Once he had dreamed that the owner of that voice might — might — . He was a brave young man, he put the thought from him resolutely, and returned carefully back home across the muddy street, home to weave rush baskets with his fingers—such clumsy fingers!—till the hot day grew into cool evening.

In the evening when his graybeard father returned he would listen eagerly to the news of the village, or the slow reading of some old newspaper. The rest of the day passed with only an occasional word with the mother, when she had work indoors, and would stop to take breath.

The shelf along the cold windowless North wall held a row of worn books, well dusted but never opened. Much of the time his mind was dreaming—dreaming of whirring machine guns, of bayonets stuck fast that slid thru one's fingers, of crashing, splintering shells, of bloodstained comrades who called faintly and yet more faintly for water—water!, till across the open came at last never a human sound.

He was a brave young man and when his fingers did not work properly he would throw off his memories, set his lips, and apply himself anew to his baskets. Nitchevo! he was still alive, had no doubt a long life to look forward to—and—he would always wear black spectacles.

* * *

The above is meant merely as an introduction. For the blind in the smaller countries of Europe books printed in raised Braille type are an unheard of luxury or totally unobtainable. Even in the larger countries like Usona, books for blind are rare and very costly. There are many thousands blind from birth and the war has added new thousands to these.

The Remedy:

Woodleigh, Shepperton, England.

July 29, 1920.

My dear Sir,

Mr. M. C. Butler, Secretary of the British Esperanto Association, has kindly given me your address in response to my inquiry for the name of a prominent Esperantist who might, perhaps, be willing to take a personal interest or interest his friends in the cause of Esperanto for the blind. No one who is acquainted with a blind Esperantist—whether he himself be an Esperantist or not—will need to be told how valuable the language has become to the blind.

There are two ways in which seeing Esperantists can greatly help their blind samideanoj throughout the world.

One is by finding out intelligent blind persons and helping them to learn the language, taking them to club meetings, etc. There are in most towns many blind individuals who though highly intelligent lead monotonous lives owing to the difficulty of making suitable acquaintances. If kind-hearted Esperantists would find means of conversing with them and would tell them about the language, many would become apt students, and it would be found that their presence at the club meeting would add much to its interest.

Blind pupils should be put in touch with the blind consul for America, Mr. E. Middleton, Greenfield, Illinois, who will tell them where they can obtain "The Esperanto Teacher" and other books in Braille.

The other way in which help can be given is by supporting the monthly Braille magazine, "Esperanta Ligilo," which after a lapse of several years during the war has now been re-started and is circulating in many countries. The circulation at present is nearly six hundred copies. The cost of production—covered for the immediate present by a generous grant from the National Institute for the blind, London, is about ten shillings per annum for each copy, but blind readers are only asked to subscribe about sixty cents, and in many cases have it free.

As the readers of "Esperanta Ligilo" are not as a rule well off, and could not subscribe a sum sufficient to maintain the journal, especially now, when prices of all materials and labor are so high, the Na-

tional Institute for the Blind, London, made a grant of £250 (nominally about 1250 dols.) per annum until otherwise determined by its council. A smaller sum has been granted by certain blind institutions in Sweden and Norway. But naturally we cannot expect any of these grants to continue indefinitely unless other countries provide substantial help. Many copies of the journal are sent to readers in Central Europe, and their gratitude is extreme, but they are unable to help financially.

If you could do anything to introduce Esperanto to blind Americans, to help them to learn it, or to find financial help for the magazine from wealthy individuals or institutions, I should indeed be grateful, not for myself, but for hundreds of the readers, with many of whom I correspond in Braille.

The "Esperanta Ligilo" is edited and published by Herr Harald Thilander, Majorsgatan 12, Stockholm, Sweden. The American blind consul (from whom further information can be had) is Mr. E. Middleton, Greenfield, Illinois.

Of course, both Mr. Thilander and I should be delighted to answer any inquiries either in English or Esperanto.

Sincerely Yours,

W. Percy Merrick.

HOW THE BLIND USE ESPERANTO

With an inexpensive apparatus Esperanto can be written in the raised Braille type now universal in Europe, and rapidly gaining ground in America. The blind Esperantists are linked together by the Braille monthly magazine, "Esperanta Ligilo," which besides providing them with translations of good literature, has in connection with it a number of "blind consuls"—one or more in each of the chief countries—to whom any reader can apply for information on any matter that specially interests him. Some readers use Esperanto chiefly for amusement, others as a means of learning foreign languages or for extending the scope of their business and learning improved methods of craftsmanship. One service rendered through the magazine deserves special notice. At the beginning of the present year the blind women of Vienna were on the verge of starvation. They had no occupation but knitting and they could get no wool. Their blindness even prevented them from stealing food! An appeal to the readers of "Esperanta Ligilo" brought them immediate succour. The English blind consul put them in touch with the Friends' War Victims Relief Society, which at once supplied them with wool, and the Scandinavian consuls raised a fund of some 4000 dols. which was sent to them in food and money.

Nejusta Jugado—Iu kiu dormis kaj ronkis dum diservo estis monpunata, sed la predikisto kiu instigis lin tiel peki ne estis punata.

el Literary Digest.

Nebruulinoj—La plej agrabla okazantajo ĉe la kinemataj bildoj estas ke kiam la virinoj malfermas la bušojn oni ne povas ilin audi.

el London Opinion.

KRISTNASKA RAKONTETO

—Meksikaj Moroj—

Estis la 1914a jaro de la Kristana Tempo kaj la 4a de la Meksika Revuelcio.

Pancho Villa ne ankoraŭ pensis dediĉi sin al terkulturado kaj al la elementa instruado de indiĝenoj en la farmbieno "Canutillo." La politikistoj grupigitaj ĉirkaŭ li, flustradis en liaj oreloj la mielajn parolojn: "Ci estos Prezidanto."

La decidiganta batalo inter la Villa' kaj Carranza' partioj estis baldaŭ okazonta kaj la unua perdos por ĉiam la oportunon esti "stategstro."

La urbo X je tiu tempo havis la honoron gastigi eminentajn kaj preskaŭ eminentajn generalojn de la Liberiganta Armeo, alloga nomo donita al ia ajn revolucionanta grupo, eĉ se ĝi nur penis detrui vilaĝojn kaj senŝargigi la pošojn de la loĝantoj.

En tiu urbo, felice, ĉiu la gastigitaj militestroj kaj soldatoj pagis ĉion tute malavare per pura nova papermono kiun Villa presigis en Usono po grande kaj senlime. Do, la komercado tie akiris nekutiman viglecon.

Kristnasko alproksimiĝis kaj multaj barakoj estis starigitaj en la ĉefa placo de la urbo, kie oni vendadas sukerajojn, fruktojn, ludilojn, k. c., por la "posadas"—ciutaga vespera festajo hejme dum oktagoj antaŭ Kristnasko—kaj spite de la natura maltrankvileco pri la politika situacio, la loĝantoj, kiel kutime inter ni meksikanoj, prenis la aferojn ŝerce.

Oni diris ke la Carranzanoj baldaŭ atakus tiun urbon, sed neniu kredis ĝin. Ĉiu amuzigis sin kiel eble plej multe.

—Cacahuate del Paso!!

—Dulces finos!!

—Piñatas baratas!!

Kriegadis la vendistoj dum amaso da acētantoj subpremis unu la alian laŭ la barakaj stratetoj.

Juna enlandulo de grandaj nigraj okuloj kaj bruna haŭto, loĝanto de najbara vilaĝo, portanta la nacian grandan rondan ĉapelon, maledelikatajn sandalojn kaj "serape"—korpkovrilo—de bluaj strioj, rigardis atente individuon kiu vendis diverskolorajn fajraĵojn en la formo de grandaj alumetoj, kaj de tempo al tempo bruligis unu el ili por montri la belan efekton.

La knabo havis en siaj manoj kelkajn kartonajn monerojn kiuj certe ne suficiis por aĉeti pakajon de tiuj fantazioj lumigajoj.

—Kiom kostas la pakajo?—demandis timeme.

—Du "pesos."

—Ho!, tio estas multe da mono al mi; ĉu vi ne povus vendi al mi por la valoro de tiuj ĉi "kartonoj"—petis li, metante la papermonon en la manojn de la vendisto.

—Jen, ci havas tri fajraĵojn.

Kaj ĝojege kaj zorge, preskaŭ ame, la knabo ruligis la tri "mirindajojn" en peco da papero, rapide eliris la placon kaj prenis la vojon al sia vilaĝo, kantante kiam li estis jam en la kamparo, la aludajn kantajojn de l' festa sezono.

"Tiren confites y canelones
Y un vaso de agua pa los mirones"

"Dissemu konfitajojn por mi, kaj glason da akvo por la aliaj."

* * *

La nokto estis malluma, sed nia knabo ne etis timigita ĉar tre ofte li venis malfrue aŭ tre frue al la urbo por meti leterojn en la Pošt- oficejo, kaj por mallongigi la vojon li deturnis sin je kurbo de ĝi por sekvi la fervojon kiu havis mallongan ponton sur profunda krutajo.

—Se mi ne rapidiĝos—diris al si mem—mia estro koleriĝos ĉar mi uzis tiom da tempo por alporti la leterojn, kaj morgaŭ li ne permesos al mi iri hejmen vespere por bruligi kun mia fratino miajn belajn fajraojn.

Kaj karese premis la pakajeton, vidante en lia meno la miron de la aliaj junaj najbaroj kiam li fiere bruligos la fajraojn.

Baldaŭ li troviĝis je la granda ponto, kaj zorge li komencis maradi sur la apartaj lignaj reltraboj, ĉar apenaŭ li povis vidi kien li metis la piedojn.

Je la fundo de la krutajo fluadis inter la ŝonegoj rivereto murmurante ĝian ĉiaman gajan kanton.

Kiam li atingis la mezon de la ponto, li haltiĝis terurigita. La lignaj reltraboj estis solaj. Mankis la reloj!

Kaj per pligrandigi lian teruron, ŝajnis al li ke li aŭdas la alproksimiĝon de vagonaro....

Li intencis kuri, sed la mallumo malpermesis tion, li povus meti piedon inter la apartigitaj reltraboj kaj fali en la krutajon.

Ankaŭ la ideo haltigi la vagonaron kaj eviti katastrofon eniris lian menson.

Kelkajn sekundojn kiuj al li ŝajnis centjaroj, restis senmova sur la ponto, aŭskultante avide ĉu efektive vagonaro venas. Jes, la bruoj de la vagonaro pro l' vento kiu blovis en tiu direkto, iĝis pli klara.

Tiam, forgesante la knabo sian propran danĝeron, malantaŭeniris tiel rapide kiel lia nervemeco permesis, dum ĉiumomente la bruoj de la vagonaro pli kaj pli alproksimiĝis.

Kiam li atingis la enirejon de la ponto, li klare ekvidis la nigran grandajon kiu kreskiĝis kaj kreskiĝis....

Kion fari? La knabo senpripense kriegis per la tuta forto de sia pulmo: "Haltu!! Haltu!!" Sed la krio perdiĝis en la silento de la nokto kaj la murmurado de la rivereto.

Kaj la vagonaro blinde alproksimiĝis kaj alproksimiĝis....

Se almenaŭ la lokomotivo havis antaŭlumigilon lumigita oni povus tuj vidi la knabon movanta senespere siajn brakojn neze de la fervojo, preskaŭ freneza de teruro pro la katastrofo kiun li antaŭvidis.

La vagonaro, sentime, ruliĝis al morto. Kion fari? Kion fari?

La reloj jam vibradis pro la proksimeco de la peza lokomotivo. La katastrofo estis neevitebla....

Subite, pro inspiro ofte komuna en similaj okazoj, rememoris la fajraojn kiujn li aĉetis por havi plezuran vesperon la sekvantan tagon, kaj rapide prenante unu el ili li frotis ĝin kontraŭ la ledplandon de sia sandalo kaj kun tremanta mano li apenaŭ movis en la aeron la

verdan lumen, kiam sonis kelkaj pafoj kaj la knabo, ankoraŭ kun la lumo forte premita en sia mano, falis teren kriante lastfoje:—Haltu!!

Kaj la vagonaro haltigis....

* * *

Villa estis ricevinta sciigojn pri suspektaj movoj de la Carranzanoj kaj telegrafe ordonis al la militestro de la urbo X sendi tuj militan vagonaron kun soldatoj kaj ĉevaloj por plifortigi difinitan garnizonon.

Grupo de Carranzanoj senditaj por skolti la ĉirkaŭajojn, faris uzon el la oportuno por demeti kelkajn relojn el la ponto.

Estis kutime dum tiuj tempoj de interna milito meti kelkajn soldatojn sur la antaŭa parto de la lokomotivo kun la ordono pafi sur ĉiu suspekta persono kiun ili vidis sur la fervojo, same kiel movadi vagonarojn nokte kun estingitaj lumoj.

Kiam nia knabo lumigis la fajrajon, la soldatoj sur la lokomotivo pensis ke li donis sciigon al la malamiko por pafado sur la vagonaron, kaj ili, tuj, siavice, pafis sur la enlanduleto.

La generalo, estro de la milita vagonaro sendis kelkajn soldatojn por inspekti la ponton kaj baldaŭ ili revenis palvizaĝaj sciigi la estron ke mankis reloj sur la ponto.

La vagonaro malantaŭeniris al la urbo X por ke oni sendu riparistojn por la ponto, kaj kunportis la kadavron de la "malamika spiono," ĉar la generalo ne povis kompreni kial la knabo kunportis tiujn fajrajnon kaj trovis sin je la ponto, je tiu horo kaj apartigita de la ĉefvojo.

La novaĵo estis baldaŭ konita en la ĉirkaŭajoj kaj facile oni povis klarigi la identecon de la knabo, kies kadavro estis liverigita al la gepatroj.

Tamen, la generalo ricevis de Villa flatantan telegramon pro lia prudenteco kaj lerteco savi la vagonaron el certa katastrofo, bedaŭrante samtempe ne povi promoti lin ĉar ne estis pli alta rango....

Kaj dum Kristnaska vespero, kiam la knaboj de la vilago de nia enlanduleto dancadis kaj saltadis ĉirkaŭ ligfajrejoj kantante:—

"Esta noche es Noche Buena y ha nacido el niño Dios"

"Tiu ĉi nokto estas Kristnasko kaj la infana Dio naskiĝis," la junia enlandulo kies mieno ŝajnis rideti pro la kontenteco de plenumita bona ago, restis sur humila ĉerko, ĉirkaŭita de sia ploranta familio kaj kelkaj najbaraj geamikoj....

Sed neniu komprenis la altegecon de la memoferiĝo de tiu nobla animo. Li estis unu el la multaj nekonataj herooj, kiuj, senbrue, honorigas homaron.

Atemaxac, Guadalajara, Meksikujo, Decembro 1920a,
Ernesto E. Guerra.

Vi estas min deviginta atendi, kiel malsagulo, dum unu horo—diris la edzo al sia edzino.

Nu! mia karegulo—diris la edzino—eble mi estas vin deviginta atendi, sed kiel vi atendis ne estas mia kulpo. —Harvard Lampoon
—Bopomano

Charles Herbert Swan, Esq., a prominent member of the Boston Esperanto Society, died suddenly of pneumonia at his home, 11 Nottingham Street, Dorchester, on December 10, at the age of forty-nine. Mr. Swan had a natural gift for languages, but was quickly attracted to Esperanto, which he saw was a master key to many nations. Indeed, following his study of Esperanto, he became deeply interested in the Russian language, and made some profound investigations into its early kinship with Greek and Latin.

Mr. Swan prepared for college at the Roxbury Latin School, in the class of 1890. He was graduated from Bates College in 1893. In both school and college he showed brilliant scholarship. He took a course at the Harvard Law School, and in 1897 was admitted to the Suffolk Bar. His specialty has been real estate.

As an Esperantist he was enthusiastic, and was greatly interested in the yearly classes in Esperanto at his fitting school, the Roxbury Latin. Several years since, with the consent of the Headmaster, he placed on the open shelves of the library, in Class II., six cloth-bound volumes of Dr. Vallienne's *La Eneido*, for the use of Esperanto students in their study of Vergil. By that means, thanks to Mr. Swan, several boys have found a legitimate yet royal road to learning.

We have also to note the following losses to the Esperanto movement:

Sir Vezey Strong, formerly lord mayor of London, an enthusiastic advocate of Esperanto.

Professor Emile Cohendy of Lyon who became an Esperantist in 1920, and was president of the Lyon group at the time of his death, Oct. 1, 1920.

Gen. Leman, the defender of Liege and honorary president of the Belgian Esperantist League.

ESPERANTO PARORLEJO

In but not about Esperanto | not over 500 words | free to all | signature and address required.
En sed ne pri Esperanto | ne pli ol 500 vortoj | por iu senpage | nomo kaj adreso postulataj

(The editors express neither approval nor disapproval of statements under this head, the facts are on the authority of the person named. Not open for any articles upon Esperanto subjects proper.)

ANONCO

Jam antaŭ la milito ekzistis simila institucio, kiu tamen pro la milito cesis. La Mondjunularo Katolika volas denove komenci la laboron kaj petas tial ĉiujn katolikajn korespondemajn gejunulojn de la tuta mondo, sciigi al ĝi adresojn. Por detalaj informoj turnu vin al la centrejo, Graz, Aŭstrujo, Karmeliterplatz 5. Bonvolu aldoni internacian respondkuponon.

"Mondjunularo Katolika,"
La gvidanto: Hanns Sappl.

PETO KAJ PROPONO

La Munhena laborista esperantista grupo aranĝos dum majo, 1921, grandan printempan feston kune kun "Esperanta" ekspozicio kaj interŝanĝado. Ni serĉas nun interesulojn, kiuj estas emaj kun ni interŝanĝi ĉiajn esperantajojn. Precipe por la interŝanĝado ni bezonus helpon de la eksterlandaj samideanoj. Ĉiu interesulo skribu aŭ sendu ian objekton de lia lando apartan, kiel, ekz., la ĥino, bonan teon, la hispano botelon da vino kaj tiel plu. Samtempe li ĉemetu ilustritan poštkarton kaj surskribu de kie venis la sendajo, kiel progresas la esperanta movado en lia lando. Li rajtas postuli de ni ion alian samvaloran de nia lando, kion ni certe alsendos. Je tia maniero ni povus efike propagandi kaj certe troviĝos tiom da idealistoj kiuj kun ni interkorespondados. Ankaŭ pri aliaj aferoj aŭ temoj ni serĉas gekorespondantojn kaj ĉiu estas petata skribi al la subskribinto.

Konrad Deubler,
Munchen, Arcisstr. 48-II r.,
Bavario, Germanio.

"E. E. A. S."

La Provizora Komitato de "Esperanta Eldona Akcia Societo" devis ĉesi por kelka tempo sian agadon pro politikaj cirkonstancoj en Polujo, sed nun kiam la vivo revenas en siajn pacajn rolojn, ĝi denove turnas sin al la tutmonda samideanaro por plua helpo en realigo de ĝiaj celoj.

Ankoraŭ kelkcent da nevenditaj akcioj restas. Kiu volas plifortigi nian propagandon kaj havi realan profiton, tiu rapidu aĉeti la restintajn akciojn.

Eldonistoj, kiuj intencas eldonadi esperantajn, bonvolu sin turni al "E. E. A. S." kiu je tre malaltaj prezoj liveros al ili menditajn.

Personoj, al kiuj "E. E. A. S." sin turnis kun propono fariĝi ĝia reprezentanto, bonvolu tuj respondi.

Reprezentantoj bonvolu tuj sendi la kolektitajn ĝis nun aliĝilojn.

Pri informoj kaj detaloj turnu Vin, aldonante responduponon laŭ jena adreso: Knav. Alfus, por "E. E. A. S." —Krakow, Bodzichow 22, Polujo.

La Provizora Komitato de "E. E. A. S."

OFFICE NOTES

We are glad to be able again to send out Amerika Esperantisto in its proper wrapper. With no envelopes in the market, it has been necessary to use ordinary wrapping paper for the past six months.

There have been many complaints of magazines not received, and as the list is properly sent out from the Central Office, it may be that coming in an unfamiliar wrapper they have been thrown aside as worthless without opening. This issue brings us up to date once more. If you do not receive your magazine within a reasonable period please advise definitely what numbers are missing. In this way only can we give you proper service.

There is a call for a copy of Dicken's "Christmas Carol" in Esperanto; this is out of print. Please advise of a copy that may be for sale, or which might be loaned, so we can take care of this request.

Another thing is,—let the members of each group, however small, join the Association, and if possible take out a Charter which costs only a dollar. This strengthens the group; the stronger the group, the more powerful the Association.

Take the examination if you wish to prove that you are proficient: the Examination Committee this year is H. W. Hetzel, West Philadelphia High School, 40th and Walnut Streets, Philadelphia, Penn.

There are upwards of sixty foreign magazines coming monthly to the Central Office: if groups would order a few once in a while, use them for reading at the meetings, and then give them away as propaganda, the value of Esperanto would soon be felt in the community. If your group wishes a collection of 25 or 50 send the order in three months in advance that they may be saved for you.

During this month there will be another call made on the Guarantee Fund, which will be the second and last call for the present year. The response to the first call came promptly and cheerfully from our guarantors.

Additional guarantors for the coming year would be welcomed for large or small amounts.

Send in your orders for the propaganda circular which is a reprint from the last page of the September number; it has been doing good work. 100 copies for \$1.00; 500 or more at 50c per hundred.

Boston is beginning to plan for the Congress next year.

We shall hold over several customary departments for the January issue.

ANTAŬEN!

Amerika Esperantisto has to face the financial problem this year as in other years. We have no millionaire backers, a number of generous guarantors subscribe all that they can to ensure that the magazine stay alive. The costs of printing and paper have advanced immensely and show no prospect of dropping. Nearly every magazine has increased its subscription price or decreased its number of issues. Amerika Esperantisto remains at \$1.00 per year. Some of our subscribers are not guarantors; for them we present in this issue a method of helping along Esperanto in America.

Upon the inner page of our back cover we print the form of a subscription card. Cut this out now and take it to your nearest Esperantist friend who does not subscribe and make it your duty to get his subscription on the spot: that is, the best way. If you can not induce him to subscribe, fill out the form and send it in with a dollar of your own around it, either for him or for some library, school, or other place where the magazine will be seen and read.

The above plan carries no premium whatever, we believe that the Esperantist requires none and will appreciate what a doubled subscription list would mean to Amerika Esperantisto and to the cause of Esperanto here in America.

**GEMS OF ESPERANTO LITERATURE
FOR THE STUDENT**
LA SANKTEJO DE L' SCIO

Sur senfina ebenajo, norde limigita de alta monto, aperis juna viro, rapide migranta antaŭen en la unuaj radicj de l' matena suno.

El la arbetajoj, kiu staris surŝutitaj per neĝfalo de blankaj floroj, el la arboj, sur kies branĉoj tremadis la unuaj delikataj folioj, alvenis al li odoro de floroj kaj kantado de birdoj.

Sed la juna viro estis indiferenta al la beleco de l' tero kaj rapidigis sian iron, firme direktante ĉiam la rigardon al la celo antaŭ li.

Iam post iam li murmuris: "Ne, mi ne trompas min; tie supre estas la sanktejo de l' scio."

Li iris antaŭen tra vilaĝoj, kie la vilaĝanoj vivadis sian simplan vivon; li iris tra popolriĉaj urboj en la tempo, kiam la laboristo rekomencaj sian bataladon pro la pano, sed li nenie restis.

Li migris antaŭen inter homaj loĝejoj, kie logas nekonataj estajoj, li iris antaŭen sen permesi haltigi sin de la alvokantaj malfeliĉuloj. Li ne retenis sian rigardon ĉe la ĝojo de la homoj pli ol ĉe iliaj malĝojoj, kaj liaj lipoj ripetadis: "Supren, supren!"

Kiam li venis trans la vasta ebenajo, la monto, kontraŭ kiun li estis migranta, leviĝis alta kaj superpotenca antaŭ li, kaj ĝia supro malaperis en malluma nubo.

En tiu momento lia vojo estis krucata de maljunulo, kiu tiregis al sia pajlo-tegmenta dometo faskon da hejtajo, tro multpezan por lia klinita dorso. La maljunulo apogis sin al ŝtona muro por repreni la spiron kaj lia frunto, malseka pro ŝvito, rakontis pri longa vivo da ĉagrenoj.

Li tre dezirus komenci interparolon kun la migranto, sed tiu ne respondis lian humilan saluton. Li eĉ ne rimarkis lin. Lia rigardo estis direktita al la altajo.

Kaj li ĉiam ripetadis: "Supren, supren!"

Kiam li atingis la piedon de l' monto, li ekhaltis por ĉirkaŭrigardi. Intencante ekdaŭrigi sian migradon, li ekvidis fonton, kiu elfluadis inter du ŝtonegoj. Juna knabino staris apude, atendante ĝis ŝia poto pleniĝos. Si mallaŭte kantis, kaj ŝia klara voĉo miksiĝis kun la boletado de l' akvo. Li petis trinkajon. La bela knabino transdonis al li la poton per siaj blankaj manoj. Dum li trinkis, ŝi diris: "Ripozu ĉe mi. Mi por vi kantos."

Sed li ekleviĝis, severe dirante: "Mi iras al la sanktejo de l' scio, supren, supren!" Kaj li rekomencaj la malfacilan suprenpašadon. Jaroj pasadis, kaj ju pli li iris supren, des pli la monto fariĝis nuda. Gi nun estis surŝutita per disaj ŝtonoj, kiuj ruligis kontraŭ la ŝtonegoj.

Post sekvis la glacio, la neĝo eterna, la mortiganta nebulo....

Sed la migranto estis persistanta. Li maljuniĝis, kaj li sentis, ke la vivo kun ĝia celo baldaŭ forkuros de li. Liaj manoj kaj genuoj sangis, li tremis pro malvarmo, li apenaŭ povis spiri en la aero maldensa. La suno estis baldaŭ subironta, sed li ĉiam ripetadis: "Supren, supren!"

The Temple of Knowledge

Upon an endless plain, bounded on the north by a lofty mountain, there appeared a young man traveling quickly forward in the first rays of the morning sun.

From the bushes, which stood sprinkled over with a snowfall of white flowers, from the trees, on whose branches were trembling the first delicate leaves, there came to him the odor of flowers and the singing of birds.

But the young man was indifferent to the earth's beauty and hastened his going, fixing ever his gaze steadily upon the goal before him.

From time to time he muttered, "No, I do not deceive myself; up yonder is the temple of knowledge."

He went forward through villages where the peasants lived their simple life; he went through populous cities at the time when the workman is beginning once more his battling for bread, but he remained nowhere.

He travelled forward among human dwellings where live unknown beings; he went forward without suffering himself to be halted by the calls of the unfortunate. He withdrew not his gaze for the joy of men any more than for their sorrows, and his lips kept repeating, "Upwards, upwards!"

When he had traversed the vast plain, the mountain toward which he was traveling towered high and prodigious before him, and its summit was lost in a dark cloud.

At that moment his way was crossed by an old man, who was with difficulty dragging to his straw-thatched cottage a bundle of fuel, too heavy for his bent back. The old man leaned against a stone wall to recover his breath, and his brow, bathed with sweat, told of a long life of griefs.

He would fain have begun a conversation with the traveler, but the latter did not return his humble greeting. He did not even notice him. His gaze was fixed to the height.

And he kept ever repeating, "Upwards, upwards!"

When he reached the foot of the mountain, he paused to look about him. Just on the point of resuming his travels he perceived a spring, which was flowing between two rocks. A young girl stood by, waiting till her pot should be filled. She was softly singing, and her clear voice mingled with the bubbling of the water. He asked a drink. The beautiful girl handed him the pot with her white hands. As he drank she said, "Rest with me. I will sing for you."

But he sprang to his feet, sternly saying, "I am going to the temple of knowledge, upwards, upwards!" And he resumed the hard upward climb. Years went by, and the higher he went the barer became the mountain. It was now sprinkled with loose stones which had rolled against the rocks.

Then followed the ice, the eternal snow, the deadly mist

But the wanderer was persistent. He became old, and he felt that life with its goal would soon flee from him. His hands and knees bled he trembled with cold, he could scarcely breathe in the thin air. The sun would soon set, but he kept constantly repeating, "Upwards, upwards!"

Fine do li estis supre. Tute malgranda plato formis la supron de la monto. Dum li ĉiuflanken rigardis, serĉante la sanktejon de l' scio, tiun sanktejon brilantan, kiun ĉe l' ekstrema horizonto li tiel ofte rigardis de ma supre, tiäm viro kun longaj blankaj haroj duone sín levis de ŝonego, sur kiu li kuſadis, dirante per sensonora voĉo al la migranto:

"Malsagulo! Vi, kiel mi, volis atingi la sanktejon de l' scio. Ne ekzistas io tiela, aŭ, pli ĝuste, ekzistas tielaj sennombraj, kaj vi preteriris ilin. La sanktejo de l' scio estas malsupre, sur la ebenajo, kiun vi forlasis. Gi estas la loĝejo de l' homoj."

Sed la migranto ne estis konvinkita.

"Kaj la senco de l' vivo?" li demandis.

"Gi enhavigas en la vivo," respondis la maljunulo. "Amu kaj suferu, kaj vi lernos eklooni ĝin."

"Kaj Dio?"

"Li troviĝas tie malsupre en la amaso, ĉie, kie brilas la fajro de la bono kaj flamas la sankta flamo de la memrifuziĝo. Returniĝu tien, de kie vi venis, se ankoraŭ por tio estas tempo. Mi estas tro maljuna. Mi restadas tie ĉi por averti viajn fratojn."

Kaj sufokante ĝemon, la migranto kun mallevita kapo kontencis depaſi la mondon. Ce ĝia piedo li denove renkontis la junan knabinton, ĉiam egale sanan, ridetantan. Sed dum ŝi konservadis sian junecon, li perdis la sian, kaj ŝi ne petis lin aŭskulti ŝian kantadon.

Nur la maljunulo, kun la dorso kurbita sub la portajo, rimarkis la migranton kaj ree salutis lin.

Tiun ĉi fojon li ekhaltis.

"Aŭdu,—li diris,— mi helpos vin."

Kaj li deprenis la multepezan portajon de la dorso de l' maljunulo.

En la sama momento, kiam li levis ĝin, malfermigis liaj okuloj. Li ekkomprenis la sencon de l' vivo, ekkonis la scion kaj ektrovis Dion.

el lingvo sveda tradukis
P. Nylen.

NOTES

These selections are designed mainly to give some small idea of the scope and richness of Esperanto literature. The English translation, while idiomatic, has the single aim of representing as faithfully as possible the Esperanto text. Of course, like every living language, the international has also its untranslatable elements, and only the adept can appreciate their beauty and possibilities in the hands of masters. The appended notes are not meant for beginners, and are critical and literary rather than pedagogical in their nature.

This month's selection is a Swedish version of the old legend immortalized in Longfellow's *Excelsior*.

H. M. S.

Sanktejo: the present selection is taken from the first year of the second oldest Esperanto magazine, *Lingvo Internacia*, and the word templo had not yet been officialized, tho it had appeared in Zamenhof's *Hamleto*. **Sanktejo** is used today, but it now takes the more general sense of "sanctuary."—**migranta:** discriminate the various

At last then he reached the summit. Quite a little flat ground formed the top of the mountain. While he was looking on all sides, seeking the temple of knowledge, that brilliant temple which from the extreme horizon he had so often regarded from below, a man with long white hair half raised himself from a rock on which he was lying, and said with a dull voice to the wanderer.

"You fool! You like me wanted to reach the temple of knowledge. There is no such thing, or rather, there are such without number, and you have gone past them. The temples of knowledge are down below, on the plain you have left. It is the dwelling place of men."

But the traveler was not convinced.

"And the meaning of life?" he asked.

"It is contained in life," answered the old man. "Love and suffer, and you will learn to find it out."

"And God?"

"He is to be found down there in the crowd, in every place where shines the fire of good and where burns the sacred flame of self-denial. Return whence you came, if there is yet time for it. I am too old. I am staying here to warn your brethren."

And suppressing a groan, the wanderer with bowed head began the descent of the mountain. At its foot he again met the young girl, still as blooming as ever, and smiling. But while she was keeping her youth, he had lost his, and she did not ask him to listen to her singing.

Only the old man, with his back bent under his load, noticed the traveler and greeted him again.

This time he stopped.

"Listen," he said, "I will help you."

And he took the heavy load from the old man's back.

At the very moment he lifted it, his eyes were opened. He saw in a flash the meaning of life, perceived knowledge and came upon God.

—Translated from the Swedish by P. Nylen.

words for "travel": *vojaĝi*, *veturi*, *vojiri*, *migri*, *pilgrimi*, *vagi*: *Migri* connotes the giving up of house and home in search of a better one.—Distinguish *arbetajo*, a bush, from *arbeto*, a shrub.—*Ŝuti* and *ŝpruci* both refer to "sprinkling," only in the one case it's a solid (as salt), in the other a liquid; also *ŝuti* is transitive, *ŝpruci* intransitive.—*tremadis*: past continuative tense: "were trembling." As we have often remarked, the best authors avoid the use of compound tenses active. The use of *-ad-*, however, is somewhat rare (cp. Grabowsky's *Kondu-kanto*, p. 115; 3, 5, 6), and usually simple *-is* suffices (cp. *Ekzercaro* sec. 20, *dormis*, etc., etc.)—iron: not *iradon*, as the simple root sufficiently expresses action.—*iam post iam*: the more usual expression is *de tempo al tempo*.—*vivadis*: cp. *tremadis* above.—*bataladon*: *-ad-* because the action is more continuous than a single *batalo*.—*sen permesi*: this usage has been proscribed by Zam. in *Lingvaj Respondoj* (No. 37), yet we find it in *Batalo de l' vivo* 84, 21 and twice in *Kabe*.—*haltigi sin=esti haltigata*: this is a very unusual construction after *lasi* or *permesi*: F. K. 34, 16; 36, 13; 43, 9, etc.—*retenis sian rigardon*:

one would naturally expect *deturni* instead of *reteni*.—*venis*: here we have the simple tense used to represent the pluperfect: "had traversed." (The following *estis migranta* is the only compound tense active in the piece, probably used for variety.)—*kontraŭ kiun*: *kontraŭ* has here the sense "toward," as not infrequently, tho strictly speaking *al* would be the right word. Why *kiun*, accusative?—*superpotenca*: a pregnant compound difficult to render.—*krucata*: oftener *krucigata*: but the *-ig-* is really superfluous.—*tiregis*: note another word difficult to translate.—*klinita . . . apogis*: dist. *klini* and *apogi*.—*vivo da*: why *da*? Cp. Hamleto, III, 2: *malludo de tia persono devas esti por vi pli grava, ol la aplaido de tuti teatro DA aliaj personoj.*—*interparolon*: the neologism *konversacio* is seldom used.—*ripetadis*: here we have the ordinary use of *-ad-* with verbs to denote continued or repeated action: "kept repeating."—*ekhaltis . . . ekdaūrigis*: we can see the force of *ek-* in the first ("came to a halt") but not in the second word.—*stonegoj*: now often replaced by *roko*, which, however, is not yet official, tho used by Zamenhof.—*Ripozu ĉe mi*: *ĉe mi* ordinarily receives the French sense of *chez moi*, "at my house."—*ekleviĝis*: here we can see the force of *ek-*: "jumped to his feet." Kabe would have said *salte leviĝis*.—*suprenpašadon*: more colorful than *suprenirado*, connoting the labor of the climb (see the definition of *paši* in Kabe's Vortaro).—*neĝo eterna*: the place of the adjective is optional, and while it usually precedes the noun, it may freely follow for euphony or emphasis.—*mortiganta . . . persistanta*: the *-ant-* seems superfluous, as the idea is adjectival rather than verbal.—*estis persistanta*: "was persistent." Not a true compound tense (see previous note).—*rigardis*: had seen: a cruder writer would have had it *estis rigardinta*. See note on *tremadis*, above.—*kušadis*: "was lying"—even the *-ad-* is superfluous.—*sensonora*: an expressive word: lit. "unringing."—*tiela*: more emphatic than *tia* (see Lingvaj Respondoj No. 8).—*senco*: a stronger word than *signifo*, = something like "higher meaning."—*memrifuzigo*: the more modern word is *abnegacio*, recently officialized.—*restadas*: note the old man's sense of the dragging of time by the use of *-ad-*.—*depaši*: *de-* in composition may have the sense of "down": cp. F. K. 32,10: *deiris*.—*la sian*: the *la* is strictly speaking superfluous, but may in usage precede the possessive if the noun is missing.—*aǔskulti ŝian kantadon*: not *sian*, since the object of *aǔskulti* if put into direct form (*vi aǔskultu mian kantadon*) would be the man, not the girl.—*portaĝo*: more picturesque than *ŝargo*.—*ree*: just above we had *denove*: there is plenty of choice of synonyms in Esperanto, and no excuse for poverty of style.—*ek-komprenis*: note force of *ek-*: lit. "caught on to." This suffix always gives the idea of suddenness. Its use in the last line of our selection is masterly.

Note the Frenchy shortness of the paragraphs in the above piece. Very different from the Slavic paragraphs of our next month's selection. In the matter of punctuation Dr. Z. very wisely left each people to their own habits. The matter is inessential.

H. M. S.

TRANSLATE INTO ENGLISH
LA KIALO

Judo faris krimon kaj la justeco kondamnis lin al mortpuno.
Je la mateno oni sciigis al li la malgajan novajon, kaj estis multaj personoj kiuj provis konsoli lin.

—Cu vi ŝatas bonan tagmangon?

—Cu vi deziras ke oni lavu al vi la piedojn?

—Cu vi intencas iop diri?

—Cu vi volas skribi testamenton?

La judo estis pensema. Fine li ridetis kaj diris: —Venigu al mi, kiel eble plej baldaŭ, la pastron de la malliberejo.

—La pastron? —ekkriis la mirigata karcerestro, —Li estas katoliko!

—Jam mi tion scias. Mi volas konvertiĝi!

Imagu kian ĝojon! Tuj la novajo trairis la urbon, kaj eĉ estis jurnaloj kiuj pritraktis la aferon.

La pastro eniris la ĉambron de la kondamnito.

—Sankta pastro —diris la judo.—Mi kore deziras ke vi baptu min.

—Cu vi kredas Kriston?

—Mi deziras ke vi baptu min, ĉar mi volas esti kristano.

La bapto farita, nia judo gaje sopiris. La sankta pastro, ploranta pro ĝojo, diris—Mia filo, vi mortos trankvila. Vi eniros la ĉielon..ktp.

Kiam la kondamnito supreniris la eſafodan ŝuparon, la pastro demandis al li:

—Diru al ni, mia filo, kial vi atendis ĝis la lastaj momentoj de via vivo, fariĝi Kristano?

—Tial ke mi ne volas ke oni diru ke judo estis punita per la morto!

el Kataluna lingvo trad. Jako Vilaseca.

BEST TRANSLATION

LA KRIZO DE OKCIDENTA CIVILIZACIO

De Gugliemo Ferrero

Mi pasigis la monatojn mardo[n] kaj aprilo[n], 1919, en Parizo. Cu vi povas diveni per ki(om)a malproksima simbolo mia imag(ad)o estis plenposedi(n)ta dum tiuj du monatoj?—la Turo de Babelo!

Unuafoje ŝajnis al mi ke mi ekkomprenis la profundan signifon de tiu frazo en la Biblio, kiu ĉiam lasis impreson de enigmoplena kaj iomete fantazia malklareco en mia menso.

Mi estas preskaŭ delogita diri ke dum tiuj du monatoj mi vidis kun miaj propraj okuloj la konfuzo[n] de lingvoj kaj la disigo[n] de popoloj efektive okazi en la koro mem de Parizo.

Nur kiam [ni] alvenos tagon pli poste ni lernos kiom da eraroj estis faritaj kaj kiom da tempo perdita de la reprezentantaro de l' tuta homaro ĉe Parizo, ĉar ili ne kunposedis unu, kaj nur unu, lingvo[n] kun kiu ĉiuj estas familiara[j].

Post la konfuziĝo de lingvoj sekvis la disigo de homaro. La nacioj reciproke turnas la dorson unu al la aliaj, kaj foriris, ĉiu al ĝia sola sorto.

Kiel ĝi okazis? Kial? Kio estas tiu ĉi nova Turo de Babelo, kiu vidas ĉi antikvan miraklon reluda(n)ta ĉe ĝiaj piedoj?

Tia estas la fatala demando de vivo aŭ morto kun kiu Okcidenta civilizacio kontraŭstariĝas.

Ni provu solvi ĝin sen timo kaj sen (kun)sindeltirigo; ĉar ĝi estas problemo kies solvo postuias, ne nur profundan pensadon, sed sentiman spiriton.

—el la ciumonata gazeto "Atlantic" por majo, 1919.
Tradukis Richard Carter, Brookline, N. Y.

Fremdländaj gazetistoj laŭdeziro ricevos de la red. de Progreso, aŭ de la "Sekcio por ekonomia kaj politika informado de la Ministerio por eksterlandaj Aferej" tute senpage notejn kaj raportojn pri Ĉeho-Slovakio.

We have long been urged to prepare an attractive, not expensive, combination "Propaganda Packet." This we have at last been able to do, thanks to a recent purchase. It will be made up as follows:

1. Primer of Esperanto, O'Connor.
2. Handy Vocabulary.
3. Kolomba Premio (or La Mopso de Lia Onklo).
4. One other piece of Esperanto literature (our selection).
5. One "Teacher's Number" of A. E.

Together these at catalog price amount to \$0.50; we will sell four packets for \$1.00.

These are just the thing needed by a lecturer as a follow-up among those interested and to get a class started.

Please specify whether you want the "Kolomba Premio" or the "Mopso" combination.

La homa fiziologio estas mirinda—diris la saĝulo. Jes—diris la mal-saĝulo—se vi frapetas iun je la dorso, vi ŝveligas lian kapon.

el Cincinnati Enquirer trad. Bopontano.

DEZIRAS KORESPONDI

One insertion: 10 cents; four insertions: 25 cents. Announcement consists only of name and full address.

Unufoja anonco: 20 sd.; kvarfoje: 50 sd. Anonco konsistas nur el nomo kaj plena adreso.

Armand B. Coigne, 193rd Street and Creston Avenue, New York, Usono. Deziras koni personojn interesatajn en int. asocio por psika enketado kiel helpontoj kaj avizantoj. Ne korespondos pri psikismo nek ia temo escepte la asocion, kaj NE RESPONDOS al PK kaj PM kolektantoj.

S-ro Jonas K. Miliauskas, Dideye Vilniaus G-ve, No. 34, Kaunas, Lithuania, Europe.

S-ro O. Armas Pullinen, Helsinki, Johannek sentie 8, interšanĝas P. M., utilosendajn. Suomio, Finnlando.

S-ro N. Rudnicki, U. E. A. no. 7149, Taškent, Centra Azio, renove korespondadas, tuj respondos.

S-ro K. Manojlović, Kuković 20, Zagreb, Krajevstvo S. H. S., Jugoslavio

F-ino J. Manojlović, Kuković 20, Zagreb, Krajevstvo S. H. S., Jugoslavio.

S-ro Bruno Cossicchi, Viaterra, Italio, P. M., I. P. K.

S-ro Hideo Jagi, Dai 3 Kotogakko, Kioto, Japanujo, deziras korespondi per I. P. K. kun ĉiulandanoj.

S-ro Inocene Gross, Houškova 32/1, Plzen, Ĉehoslovakio.

Shanghai, China, 35 Broadway East, junulo deziras korespondadi precipe letere aŭ P. K. pri diversaj temoj. Interēs. per P. K. kaj P. M. Ciam kaj al ĉiuj respondas.

S-ro Fr. Pilny, Husova 187, Jičín, Čehoslovakio.

La AKROBATO de Nia Sinjorino
BLANCHE, la Virgulino de Lille (Schubin)
La ROZUJO ĈIUMILJARA (Wagnalls)

Po \$.35.

MIMI, Rakonto pri la Latina Kvartalo
dum la Milito (Giesy)

Po \$.35.

La unuaj eldonajoj tradukitaj de

S-RO EDWARD S. PAYSON

Prezidanto de la Esperantista Asocio de Norda Ameriko

Aĉeteblaj ĉe la Esperanto Office,

Pierce Bldg., Copley Sq., Boston, Mass.

Po \$0.35

THE WRITER'S MONTHLY

Edited by J. Berg Esenwein

A magazine of real help for those who write.
Carolyn Wells says:

"The best magazine of its kind because it
is practical."

Single copies 15 cents ... \$1.50 a year

THE WRITER'S MONTHLY, Dept. A
Springfield, Mass., U. S. A.

ATTENTION! ESPERANTISTS!

The LLANO PUBLICATIONS

record the doings of the Llano Co-operative Colony in Louisiana. This group of co-operators are using Esperanto largely and aim to use it in their every day work." It is probably the only community of its kind. Children are taught Esperanto in the High school course. They are also co-operating in the production and distribution of the necessities of life. They have a beautiful social life in a healthy happy community. Write for literature and ask for a sample copy free.

LLANO CO-OPERATIVE COLONY
Leesville, Louisiana.

Form of subscription card, see p. 9—We will send 10 cards for \$9.00.

\$1.00

SUBSCRIPTION CARD

THIS CARD IS GOOD FOR

\$1.00

AMERIKA ESPERANTISTO

ONE YEAR

No book or other premium is included with this Subscription


NAME OF SUBSCRIBER

STREET OR ROUTE

TOWN AND STATE

ISSUED TO

BY



La
**"Cherita
Grand"**

2
Longa
56
Colojn
S

Kiel Esperanto, la universala
lingvo, entenas en si ĉiujn el la
plej bonaj elementoj de ĉiuj ling-
voj kaj prezentas novan kaj tute
apartan peron, tiel ankaŭ la
"Cherita Grand," eltirante el di-
versaj fontoj, montras tre unikan
instrumenton; la plej malgranda
"Grand."

EMERSON PIANO CO.
[Fondita 1849]

EDWARD S. PAYSON, President

Boston, Mass., Usono